Heinrich Neye,

# Malnovaj hejm-rimedoj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Jarcento nia - oni diras,
ke temp' de laco estas ĝi,
malmulte mi pri tio miras,
ĉar laca estas ankaŭ mi.

Fratinoj, ankaŭ fratoj miaj,
plej multaj, kiujn konas mi,
pro siaj ŝarĝoj profesiaj
fariĝas lacaj pli kaj pli.

Mi malakordon tie vidas,
abisme ja aperas ĝi:
Teknik-progreso pli rapidas
ol hom' sur tiu Tero ĉi.

La kor', de kafo akcelite,
tag-nokte daŭre batas ĝi,
de l' tempo-premo plu pelite
sur la viv-vojo hastas ni.

Multegaj ja nuntempe estas
rimedoj kontraŭ la lacec',
sed la plej bonaj ĉiam restas
la dormo kaj la dikhaŭtec'.

...

Heinrich Neye,

# Alte Hausmittel

Man sagt, das zwanzigste Jahrhundert
sei das der großen Müdigkeit,
was mich persönlich wenig wundert,
ich gähne auch die halbe Zeit.

Und meine Schwestern, meine Brüder,
die meisten Menschen, die ich frag',
sie sind zum großen Teil noch müder
trotz Urlaub und Achtstundentag.

Ein Zwiespalt scheint mir hier zu klaffen,
der gähnend in Erscheinung tritt:
Der Mensch, aus Fleisch und Blut geschaffen,
kommt mit der Technik nicht mehr mit.

Das Herz, von Coffein befeuert,
klopft Tag und Nacht im dritten Gang,
von Hast und Hetze ferngesteuert
jagt man den Lebensweg entlang.

Es gibt zwar viel, sich wach zu halten,
doch was noch stets ins Schwarze traf,
das sind die Mittel unsrer Alten:
Ein dickes Fell und reichlich Schlaf.

...

*Traduko de la Germana poemo "Alte Hausmittel" de* HEINRICH NEYE *(∗1913-02-27 – †2002-07-18) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

*Arg-104-210 (2014-04-16 11:22:22)*

*Verkita estas la poemo de s-ro Henriko Najo (Heinrich Neye, 27.02.1913 – Juli 2002), Esperantigis ĝin: Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff, *04.11.1938) en 2006-03-04 laŭ la origina germanalingva teksto. La germanalingva teksto de tiu ĉi poemo aperis en 1994 en la germana agronomia gazeto „Landwirtschaftliches Wochenblatt" (Agronomia Semajnfolio).*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* HEINRICH NEYE *(∗1913-02-27 – †2002-07-18).*

*Arg-104-209 (2006-03-03 11:44:21)*

*Aus der Zeitschrift "Landwirtschaftliches Wochenblatt" [Presseorgan des Westfälisch-Lippischen Landwirtschaftsverbandes, Postfach 4929, D-48028 Münster/Westfalen.], erschienen in einer Ausgabe des Jahres 1994.*